

No 02
1965

G.L.GIMELLI

# ITALA fervojisto

Organo
Associazione
Italiana
Ferrovieri
Esperantisti





IFEA

# NEKROLOGO

En Amsterdamo la 15-an de februaro 1965 mortis la redaktoro de "La Internacia Fervojisto" kolego

DANIEL BURGLER

La neatendita sciigo trafis nin profunden. Niaj pensoj tuj iris al la edzino kaj aliaj gefamilianoj, ĉar ilin trafis pli forta bato; sed la tuta Esperantistaro kaj precipe la Fervojista Esperanto-movado perdis gravan laboranton. La forpaso de kolego Burgler malpleniĝas ne nur lian hejmon sed ankaŭ nian Movadon pro la tre grava laboro de li farita por IFEF.

Kiam mi legis la sciigon ke mia amiko Burgler mortis, mi konsterniĝis ĉar li estis ankoraŭ sufiĉe juna (nur 61 jaraĝa) ĉiam vigla, ĉiam gaja, ĉiam laborema; tiel li restos en mia memoro.

Ni povos plej inde lin honori per agemo por nia komuna idealo, kaj svingi la flagon kiun li transdonis al ni.

Ni sincere kondolencas lian familion kaj la Nederlandan sekcion kaj la IFEF-estraro tiel trafitaj. Li ripozu en paco!

oooooooooooooooooooooo

La 22-an de januaro 1965, trafis nin alia bato, en Massa (Italujo) forpasis la nobela-virino:

CLARA VISDOMINI Vidvino DAZZINI

Patrino de la fervoraj gesamideanoj D-ro Mario Dazzini, Prezidanto de Massa Esperanto-Grupo, kaj Prof-ino Catina Giulia Dazzini membrino de nia Asocio kaj Komitatanino de I.L.E.I.

Clara Dazzini, bonmerita samideanino estis simpatie konata en la Esperanto-Movado pro sia partopreno al niaj multnombraj aranĝoj ĉiam ridetanta, ĉiam gaja.

Al niaj karaj geamikoj D-ro Mario kaj Prof-ino Catina, tre konataj en nacia kaj internacia Esperanto-Movado ĝenerale kaj inter la Fervojistoj-Esperantistoj, ni sendas la sincerajn kondolencojn de I.F.E.A. kaj I.F.E.F.

# 17-a INTERNACIA FERVOJISTA KONGRESO

## HAMAR (Norvegujo), 22 ĝis 28-5-1965

Korespondadreso: Poŝtkesto 61, LØTEN (Norvegujo). Bankkonto: 300/924 Vangs Sparebank, HAMAR (Norvegujo). Telefono: 271 Löten aŭ 22159 Hamar.

LASTAJ INFORMOJ:

TRANOKTADO EN HAMBURG LA NOKTON 19/20-5-1965.

Ni tranoktos en "Fremdenheim St. Pauli, Reeperbahn 154, 2 HAMBURG 4". La prezo po persono inkluzive matenmanĝo estos 9 Germ. Markoj pageblaj al la hotelestro.

TRANOKTADO EN OSLO LA NOKTON 21/22-5-1965.

Ni disponas litojn en dormvagonoj proksime de la Orienta Stacidomo, Oslo Ø. Se aliĝos pli granda nombro da gepartoprenantoj ol la nombro da litvagonoj, kiujn ni disponas, mi volonte mendos hotelĉambron, sed tio estas pli multekosta ol tranoktado en dormvagonoj.

Bonvolu sendi absolute antaŭ la 1-a de majo, pere de poŝtmandato al: Norvega Esperanta Fervojista Asocio, Odd KOLBREK, Kallbakkstubben, 22 OSLO 9 (Norvegujo), N.kr.25,- por la ekskurso kaj por la tranoktado. Se vi deziras partopreni en la ekskurso, kaj mem prizorgos la tranoktejon, bonvolu antaŭpagi N.kr.15,- (Proksimuma Prezo). Se vi pro iu ajn kaŭzo ne povas veni al Oslo, sed antaŭpagis, S-ano Kolbrek resendos la monon.

PLANO PRI LA EKSKURSO TRA OSLO LA 21-a de majo 1965.

Oni petas ke vi venu precize je la 15 horo en la halon de Oslo Ø, la Orienta Stacidomo de Oslo. La gvidanto estas facile trovebla, li portos Esperantoflageton. La ekskurso kiu okazos en aŭtobusoj, estas 3-hora.

Krom la urbo ni vizitos Frognerparken, kun la skulptaĵoj de Gustav Vigeland. En la idilia duoninsulo Bygdø, ni vizitos la ŝipon FRAM tiu de la esplorvojaĝoj de Frithjof Nansen kaj Roald Amundsen en la Polusaj Marregionoj, poste ni rigardos la floson KON-TKI, kaj ŝipoj de la Vikinga epoko.

La vespero estas libera.

POSTKONGRESA VOJAĜO.

La mendoj oni jam sendis al la Vojaĝoficejo de N.S.B. La bileto pri via vojaĝo laŭ alternativo n-ro 1, vi pagos kaj ricevos en Vojaĝoficejo de N.S.B. en Hamar Stacidomo dum la Kongreso. BONVENON AL OSLO KAJ AL NORVEGUJO!

## EUROPA ESPERANTO + KONFERENCO - 1965 - VIENO

### 11-7 ĝis 17-7- 1965

Okaze de E.E.K. la fremdultrafika oficejo de la registaro por Malsupra Austrio eldonis esperantlingvan varbilon. La varbilo estas bela multkolora informilo pri tiu ĉi bela regiono, kiu ĉirkaŭas Vienon. Krom koloraj bildoj ĝi enhavas ankaŭ reliefbildmapon de tiu ĉi austria liglando, al kiu kondukos la samideanojn la autobusoj de la konferenco.

Kontraŭ unu internacia respondkupono ĉiu esperantisto ricevos tiun ĉi belan bildmapon kun du aliaj esperantlingvaj fremdultrafikaj varbiloj.

Prelegos dum Europa Esperanto-Konferenco: La Prezidanto de U.E.A. Prof. D-ro Ivo Lapenna pri: "Lingvaj problemoj en la internacia politiko".
La Vicprezidanto de U.E.A. D-ro Wensing pri: "La evidenta praktika valoro de Esperanto en internaciaj ekonomiaj rilatoj".
Prof. L.Laurat-Parizo pri: "Esperanto en ekonomi-politikaj rilatoj".
La Direktoro de I.E.M.W. kort.kons.H.Steiner pri: Esperanto en la literaturo
La komitatano de Austria Esperanto Instituto, E.Werner, pri: "Esperanto kaj turismo". Rigardante tiun ĉi altrangan programon kaj la eminentajn prelegontojn ankaŭ vi konstatos: "VIENO INDAS VIZITON". Organiza Komitato de E.E.K.

## INTERNACIA TRAFIKEKSPOZICIO 1965

La 25-an de junio 1965 malfermiĝos en München la pordoj por la Internacia Trafikekspozicio, kiu daŭros ĝis la 3-a de oktobro. Sur areo de 500.000 $m^2$ estos demonstrataj mondvaste la grandaj temoj pri reltrafiko, poŝtaj kaj telegrafaj instalaĵoj, aŭtotrafiko, publika urba trafiko, portrafika sekureco kaj eduko, kosmonaŭta trafiko, ŝnurfervojoj kaj montarliftoj. Krome estos reprezentataj ŝipveturado, fremdultrafiko, radio kaj televido, energia provizado kaj multaj aliaj specialaj fakoj.

La Esperanto-Grupo Munkeno, kiu aranĝis en la jaro 1951 la 36-an U.K. de Esperanto, nun sukcesis konvinki la Organizan Komitaton de la I.T.E. 1965 en Munkeno pri la valoro de prospekto en Esperanto. Tiu ĉi prospekto estas tre belaspekta. Tiuj kiuj deziras kelkajn prospektojn, bonvolu mendi ilin sub la adreso: Internationale Verkehrs-Ausstellung, Theresienhöhe n-ro 13, 8 München 12, Deutsche Bundesrepublik.

Esperantistoj, kiuj intencas viziti ITE kaj renkontiĝi kun ni, bonvolu informi nin jam antaŭ la veno al Munkeno. Kiam ili volas renkonti plurajn esperantistojn ankaŭ el aliaj landoj, ili venu en semajno antaŭ aŭ post la "Eŭropa Esperanto-Konfrenco", 11-17/VII, 1965 en Vieno, por ke ni povu aranĝi komunajn renkontiĝojn. Tre interesa tempo por via vizito estus ankaŭ la tagoj inter la 18-a de septembro kaj la 3-a de oktobro, ĉar dum tiuj ĉi tagoj okazos en Munkeno ankaŭ la granda kaj unika plezura festo, kiu fariĝis konata - eble jam mondkonata - sub la nomo "Oktobra Festo", kaj kiu allogas ĉiujare milionojn da vizitantoj, inter ili multajn el ĉiuj partoj de la mondo. Skribu al: Esperanto-Grupo Munkeno, Konrad DEUBLER, Prezidanto, 8 München 13, Agnesstrasse 5/III, Bayern, Deutsche Bundesrepublik.

## INAŬGURO DE ESPERANTO STRATO EN "VILLAFRANCA DI VERONA"

La 29-an de la venonta junio, okaze de la malnova fojro de Sankta Petro, okazos en "Villafranca di Verona" Esperanta tago. Tiuokaze oni titoligos al "Esperanto" iun straton de la fama urbeto.

## "LA FILATELISTO" FINAS

Malĝoja okazintaĵo! Profesiaj devoj ne plu permesas al S-ro Jules Coste daŭrigi eldonon de nia kara "LA FILATELISTO"! Post 15 jaroj, li devas "mortigi" nian ligilon! La plej eble li malfruigis tiun morton, sed hodiaŭ li ne plu povas . . Sed li esperas, ke en 1969-a, kiam li estos pensiulo de

la franca fervojo, kie li nuntempe laboras, li havos pli da tempo por propagandi Esperanton, kaj li denove povos eldoni "L.F." sub pasinta formo, aŭ sub alia formo. Atendante, li konservos zorge adresaron, por religi kun ĉiuj en 1969-a, eble . . .

EŬROPA FERIO-SEMAJNO EN SVISLANDO DE LA 22-a ĜIS LA 28-a DE AUGUSTO 65

Ankaŭ la sepa E.F.S. okazos en Caslano apud Lugano en la"Svisa Sunĉambro", do en unu el la plej belaj regionoj en la koro de Eŭropo.

Dimanĉe, je la 16-a horo ni kolektiĝos ĉe la sama loko kiel lastjare, nome antaŭ la stacio de la fervojo Lugano Ponte-Tresa en Lugano. Post la disdono de la biletoj ni forveturos al Caslano.

Lunde. Libera mateno por esplori promenante la belan ĉirkaŭaĵon. Banado eblas.Nia posttagmeza celo estos la monto Brè.

Marde. Denove en la altaĵon, nome sur la monton San Salvatore. Poste al Melide por admiri "Swissminiatur" kaj en kvieta ŝipveturado hejmen trans Ponte-Tresa.

Merkrede. Jam matene al Dino (tipika tiĉina vilaĝo). Unuhora promenado ĝis Tesserete kaj trame al Lugano. Tie libera posttagmezo por butikumi aŭ kio ajn vi deziros fari.

Ĵaŭde. Fervoje kaj ŝipe al Osteno (Italio) por foje esplori tiun ne tiom konatan lagobrahon. La tuta restadtempo estos je via libera dispono. Posttagmeze reen trans Porlezza kaj Lugano.

Vendrede. Tute libera tago por ripozo. Tamen por la nelaculoj ekskurso al Capolago. Ebleco por bani aŭ sunumi kelkajn horojn aŭ veturi per dentradfervojo sur la monto Ĝeneroso (prezo S.fr.7). Gaja vespero.

Sabate. Trans Ponte-Tresa ŝipe al Lugano. Fino je la 12-a horo.

P.S. Antaŭ aŭ post la F.E.S. vizitu la Svizan Trafikdomon en Lucerno: Mirinda kolektaĵo de trafikiloj ĉiaspecaj kaj elmontrofenestro por propagandi E.

Prezoj po persono en svisaj frankoj: 155,- inkluzive ekskursoj, organizaj elspezoj, pensiono en 8-persona dormejo, trinkmono k.t.p. Limdato por la aliĝilo = 15-an de junio 1965 al la organiza adreso: S-ro Hans Hunkeler, poŝtfako 417, CH 5001 AARAU (Svislando).

FERIOSEMAJNO EN ZWOLLE (NEDERLANDO)

Provizora programo de la feriosemajno de la 31-a de julio ĝis la 8-a de aŭgusto 1965-a. Fervojistoj kun konatoj estas bonvenaj.

Sabato 31 julio. Kunveno de la partoprenontoj je la 2-a horo tagmeze antaŭ la stacidomo por interkontakti kun la gastigantoj kaj la akceptkomitato.

Dimanĉo 1 aŭgusto. Libera tago por viziti la preĝejon.

Lundo 2 aŭgusto. Kunveno je la 10-a horo je la Sukra monto (Suikerberg) kie okazas Esperanto-leciono per naturmetodo. 11,30-13,30 libera horo por manĝi 13,30 Forveturo de la aŭtobusoj por ekskursi preter Hasselt kaj Zwartsluis al Giethoorn "Hollanda Venedigo" tie ŝipveturo de la 8-a ĝis 10-a horo.

Mardo 3 aŭgusto. Kunveno je la 10-a horo je la Sukra monto kie okazas naturmetoda Esperanto-leciono. 11,30-13,30 manĝo paŭzo hejme. 13,30 Forveturo de la aŭtobusoj por ekskurso al Elburg kaj "Orienta Poldero" vizito al la tute nova poldero kaj muzeo en Lelijstad. Vespere koncerto.

Merkredo 4 aŭgusto.Kunveno je la 10-a horo je la Sukra monto por naturmetoda Esperanto-leciono. 11,30-13,30 manĝo paŭzo hejme. 13,30 Forveturo de la aŭtobusoj por ekskurso al Arnhemo vizito al la Subĉiela muzeo tie.

Ĵaŭdo 5 aŭgusto. Tuttaga aŭtobusekskurso de la 10-a matene ĝis la 10-a vespere al Amsterdamo, Monnikendamo, Marken, Volendamo, Alkmaar, trans la granda mardigo inter la norda maro kaj Ijsellago al la Frislando de tie al Zwolle.

Vendredo 6 aŭgusto. Je la 10-a horo Esperanto-leciono sur la Sukra monto. 11,30-13,30 manĝo paŭzo hejme. 13,30 Forveturo de la aŭtobusoj por ekskurso al la tute preta Nord-Orienta Poldero vizito al la iamaj insuloj Schokland kaj Urk poste al la ĉefurbo Emmeloord kie ni havos koncerton de la 8/10 h.

Sabato 7 aŭgusto. Ni ekskursos la tutan tagon en Zwolle. Vespere granda festo

Dimanĉo 8 aŭgusto. Fino de la semajno. La prezo por la tuta semajno, enkalkulite 8 tranoktojn 21 manĝojn, aŭtobusekskursojn, vizitojn al muzeoj kaj al artvendejo kaj la E-lecionojn, kostas nur po 90 holandaj guldenoj.

## INAŬGURO DE ESPERANTO-STRATO EN CASALECCHIO DI RENO

Dimanĉon la 11-an de aprilo okazis en Casalecchio di Reno (Bologna), inaŭguro de strato titolita "ESPERANTO". Je la 9-a kaj duono akceptis nin agrabla muzika trupo kiu gaje sonante altiradis ĉiam pli da popolo kiu amasiĝis antaŭ la Urbodomo. Poste ĉe Konsilantara salono de la Komunumo, antaŭ multnombra publiko, la urbestro S-ro Athos Garelli tra la tuta konsilantaro bonvenigis la esperantistojn per taŭga parolado. Li salutis la ĉeestantojn en la nomo de la urbestraro kaj de la tuta loĝantaro, dankante la Bolonjan Grupon kiu donis al li kaj al ĉiuj estraranoj de Casalecchio, la okazon koni Esperanton kaj ĝian noblan idealon. Li deklaris sin feliĉa dediĉi al esperanto novan straton, kaj promesis helpi la restarigon de Esperanto-Grupo kaj organizadon de novaj kursoj en Casalecchio.

Respondis per flamaj vortoj, je la nomo de Itala Esperanto Federacio kaj de la tuta esperantistaro D-ro Dazzini, kiu dankis kaj gratulis la urbestraron de Casalecchio pro la bona iniciato eknomi "ESPERANTO" novan straton kaj organizi tiel belan manifestacion.

Intertempe la multnombra urba muzikistaro komencis ludi en la korto de la Komunumo. De tie startis la sekvantaro, malfermita de la standardo de la komunumo inter urbaj gardistoj sekvita de la muzikistaro kaj de la flago de la Bologna Esperanto-Grupo inter du gejunuloj. Sekvis la urbestro, la urbestraro, la esperantistaj aŭtoritatoj kaj la partoprenantaro al kiu aldoniĝis la urbanoj laŭlonge de la strato.

La sekvantaro atingis la novan kaj modernan straton "Esperanto"ornamita per naciaj kaj esperantaj flagoj, trairis ĝin kaj revenis ĉe la komenco de la strato kie estas la nova tabulo, kovrita per drapo, kaj la laŭtparolila instalaĵo. Tie okazis la festparolado de la Direktoro de la Itala Esperanto Instituto Prof-ro Agostini. La brila parolado vekis la aplaŭdojn de la multnombra ĉeestantaro kaj de la loĝantaro de la modernaj konstruaĵoj laŭlonge de strato "ESPERANTO", kiu sekvis la manifestacion de la balkonoj, fenestroj kaj terasoj.

Post la parolado de Prof-ro Agostini, la urbestro malkovris la tabulon kaj la muzikistaro ludis brile la lastajn pecojn antaŭ ol fini la unuan parton de la manifestacio.

Renkontiĝis poste, ĉe famkonata restoracio "Calzavecchio", kie kune tagmanĝis, en granda ornamita salono, pli ol 100 personoj en gaja harmonio. En la centra tablo sidis la urbestro, Prof-ro Agostini, D-ro Dazzini, la urbestraro kaj la esperantaj aŭtoritatoj. Post bongusta manĝado oni ludis tombolon kun paskaj premioj, dancis kaj promenis en la bela parko de la restoracio ĝis vespere. Grupo de samideaninoj el Parma akompanataj de la urbestro kaj de aliaj partoprenantoj vizitis la Pilgrimejon "San Luca" sur la "Colle della Guardia" apud la urbo Casalecchio di Reno.

Vespere ĉiuj reveturis hejmen kontentaj pro la bela kaj fruktodona pago pasita en "Esperantujo" propagandante nian karan lingvon.

## POLA RADIO OKAZE DE LA XVIII BICIKLISTA PAC-KONKURO

Laŭ tradicia kutimo la Pola Radio ankaŭ en la nuna jaro proponas agrablan distron. Lige kun la XVIII Internacia Biciklista Pac-Konkuro organizas grandan sportan konkurson.

Sur vojoj de Germana Demokratia Respubliko, Ĉeĥoslovakio kaj Pollando rivalos en la nuna jaro biciklistoj el 20 landoj. La XVIII Pac-Konkuro komenciĝos en Berlino la 8-an de majo. El Germana Demakratia Respubliko la biciklistoj pedalos al Ĉeĥoslovakio, kaj poste ekbiciklos sur Polaj vojoj. La fino de la aranĝo okazos la 23-an de majo en Varsovio.

En la konkurso oni starigas du demandojn:

1) Divenu la naciecon de la biciklisto, kiu fariĝos venkinto de la XVII Pac-Konkuro Berlino-Prago-Varsovio,
2) Divenu la ŝtatojn, kies teamoj okupos la unuajn lokojn en la definitiva kolektiva klasifiko de la XVIII Pac-Konkuro (unua kaj dua posteno).

Inter la partoprenintoj de la konkurso, kiuj al la adreso de la Pola

Radio alsendos trafajn respondojn al tiu ĉi demandoj, estos lotumitaj valoraj premioj. Respondojn al la demandoj oni devas sendi ĝis la 15-a de majo inkluzive (decidas la dato de la poŝta stampo) al la adreso: Pola Radio, Varsovio, Pollando - kun la kromnoto: "Sporta Konkurso"Sporta Konkurso". La respondojn ni petas sendi sur poŝtkartoj.

## MANIFESTACIO PRO LA LEPRULOJ

La 5-an de aprilo en Bologna okazis parolado de Raol FOLLERAU (la apostolo de la leprulo j), en la Komunuma Teatro, kun la ĉeesto de la ĉefaj autoritatoj. En tiu okazo estis prezentitaj proponoj presitaj en Esperanto por la kolektado de subskriboj. Tio eldono (kiu sekvis tiun de la preĝo de la leprulo j en Esperanto) okazis per klopodo de samideanoj de Bologna.

La celo de tiu kolekto da subskriboj estas peti al ĉiuj nacioj la halton de la armiĝo dum unu tago. La mono ŝparota estus donanta por la kuracado de la leprulo j.

En la mirinda salono de la Komunuma Teatro, fama verko de la arkitekto Bibiena, oni parolis pri Esperanto kaj pri la helpo ke la Bolognaj Esperantistoj donis al la movado por la leprulo j.

## E S P E R A N T O E N L A R A D I O

## PETICIOJ POR LA VATIKANA RADIO

El la Bulteno de C.E.C.R. ni elĉerpas jenajn novaĵojn:

Estas jam multaj radio-stacioj en la mondo, kiuj uzas Esperanton: Italujo, Pollando, Bulgario, Svislando, Brazilo, Nederlando, Hispanujo, Jugoslavio, Koreo (Norda), Gvatemalo, Ĉeĥoslovakio, Aŭstrujo, Francujo k.t.p. Nun ankaŭ Ĉinio enviciĝis en la liston de la regulaj dissendantoj. Pro tio, laŭ sugesto de diversaj katolikaj esperantistoj, oni decidis lanĉi petkampanjon por obteni ke ankaŭ la Vatikana Radio envicigu la internacian lingvon Esperantan inter la multaj naciaj lingvoj de siaj programoj. Jam la letero al la Konciliaj Patroj, verkita latine de Prof-ro Agostini, informante pri Esperanto, vekis grandan eĥon inter la Episkopoj, Ordenaj Ĝeneraloj k.t.p., kiel atestas la multaj favoraj respondoj amase alvenintaj al la verkinto. La Papo mem aŭskultis kun granda intereso la Estraron de I.K.U.E., kiam ĝi estis de li aŭdience akceptita la 19-an de majo de la pasinta jaro. Ŝajnas do ke ĉi tiu estas tre favora momento por tiu peto.

Pro tio estis invititaj la katolikaj esperantistoj el la tuta mondo, kaj ĉiuj aliaj, interesitaj al la progreso de la movado, skribi rekte al la Papo tiucele. Kvankam antaŭe oni konsilis adresi tiujn leterojn al la Vatikana Ŝtato, ŝajnis poste pli konsilinde, ke tiuj leteroj al la Papo estu enfermitaj sub koverto adresita al: Resp.P.Hiacinto Jacobitti, Piazza S.M. Maggiore, 8 ROMA (Italujo), tial ke oni povos kolekti en dece bindita dosiero kun ĉiuj oportunaj ilustraĵoj, kaj tiel prezenti siatempe ĝin al la Papo, kaj verŝajne restos kiel dokumentaro en la arkivo de la Vatikana Radio. Tiam la leteroj sekvis la novan vojon. Sed bedaŭrinde ne malmultaj el la unuaj - kaj ni povas aserti - la plej fervoraj, estis jam senditaj kaj ne plu rehaveblaj. Kion fari? Facila rimedo: oni povas tute simple reskribi ilin. Ni varme petas do de la skribintoj kaj de la varbintoj, ke ili verku novan leteron, por ke tiu trovu sian lokon en la albumo transdonota al la Papo. Nur tiamaniere ĝi restos kaj efikos. Por ĉiu estas tre malgranda ĝeno - sed eble eĉ ne ĝeno! - sed por la amaso estas valora akiraĵo.

Inter la jam alvenintaj ni posedas petojn de elstaraj esperantistoj kaj de simplaj samideanoj, de grupanoj kaj lernantoj, de laikoj kaj de ekleziuloj aŭ religiulinoj. Kaj tio, kio karakterizas ĉi tiun kampanjon, estas ĝia altniveleco. Konsciante, ke sia letero estos sub la okuloj de la altega personeco, kia estas la Papo, ĉiu sin prezentas kiel eble plej dece kaj ĉe liaj vortoj ĉiam ludas sian rolon la senlima devocio aŭ la respektego por la adresanto. Vere belegaj leteroj, nepre elaŭdindaj.

SENDANTE AL VI ĈI TIUN CIRKULERON, PATRO JACOBITTI INTENCAS INVITI ANKAŬ VIN FORMALE HELPI, LA KAMPANJON PER VIA PERSONA LETERO KAJ PER VIA SUGESTO AL VIAJ KONATULOJ, POR KE ANKAŬ ILI SKRIBU SAMCELE; AŬ SE VI JAM FARIS TION, ĈI TIU CIRKULERO ESTU ESPRIMO DE LIA SINCERA DANKO KAJ DEZIRO DE BONA SUKCESO AL VIA KUNAGADO.

## D E Z I R A S   K O R E S P O N D I

- 70-jaraĝa emerita fervojisto"Andreo BEISETZER, Budovatelska 11 PREŜOV (Ĉeĥoslovakio)
- Kun ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj kaj interŝanĝi poŝtmarkoj kaj poŝtkartoj, diskoj, muziko, sportoj, fotoj, E-revuoj: Anatolio ĈEGODAEV, Luganskaja obl. Kommunarsk- 4 DO VOSTREBOVANIA - Ukraino - U.S.S.R.
- Ròza HALAŜR, Tàpiòsrcle, Bartòk B. n. 34 (Hungario): geografia instruistino kun italaj gesamideanoj kaj eventuale viziti ilin somere kaj ilin gastigi en Hungarujo okaze de la U.E.A.-Kongreso venontjare.

## E S P E R A N T O   E N   L A   R A D I O

RADIO ROMA - ESPERANTO-FAKO = Casella Postale 320 ROMA (Italia)

DISSENDOJ EN ESPERANTO-Jaro 1965-a. La dissendoj okazas de h.17,35 ĝis h. 17,50 (M.E.T.). Ondlongoj: metroj 25,20 = Mc/s.11,90 kaj metroj 31,33 = Mc/s.9,57. Redaktoro: Luigi MINNAJA. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto", la unua parto al la ĉi-subaj temoj:

M A J O   1 9 6 5 - a

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1999 | dimanĉon la | 2-an: | Tra la literaturo |
| 2000 | " | 9-an: | Nia 2000-a dissendo |
| 2001 | " | 16-an: | Italaj kanzonoj en Esperanto |
| 2002 | " | 23-an: | Rimini la urbo de la 36-a Kongreso de la Italaj E. |
| 2003 | " | 30-an: | Kristana mondo |

J U N I O   1 9 6 5 - a

| | | | |
|---|---|---|---|
| 2004 | dimanĉon la | 6-an: | Tra la literaturo |
| 2005 | " | 13-an: | Novaĵoj el Italujo |
| 2006 | " | 20-an: | Italaj kanzonoj en Esperanto |
| 2007 | " | 27-an: | La fontanoj de Siena |

PAROLAS LA POLA RADIO - VARSOVIO...

Programo de la Elsendoj en Esperanto - Aprilo 1965-Oktobro 1965.

Radio Varsovio disaŭdigas ĉiutage de la horo 16,30 ĝis la 17 horo laŭ la mezeŭropa tempo duonhoran programon en Esperanto nur la jenaj ondoj:

| | | |
|---|---|---|
| mallongaj | 41,18 m. = 7285 kc/s. | 41,27 m. = 7270 kc/s. |
| | 41,99 m. = 7145 kc/s. | 42,11 m. = 7125 kc/s. |
| | 48,90 m. = 6135 kc/s. | 50,04 m. = 5995 kc/s. |
| | 50,42 m. = 5950 kc/s. | |

kaj sur la meza ondo 200 m. = 1502 kc/s. Aŭskultu niajn konstantajn elsendojn. La taga programo estas la sama de la pasintaj ses monatoj.

POLA RADIO, Esperantaj disaŭdigoj, VARSOVIO (Pollando).